

2017-10-31

UNUJARA RITE (Reta Instruista Trejnado de Esperanto) KUN DU KURS-SEMAJNOJ EN POZNAN, POLLANDO

ILEI kunlabore kun Katalin Kovats, redaktoro de edukado.net (*forvishu spacojn*) proponas **intensan trejniĝon pri instruado de Esperanto tra la tuta jaro 2018.**

La formado konsistas el du partoj: reta preparkurso pri metodiko plus partopreno en du kurs-semajnoj kun ĉeestaj atelieroj kaj ekzamenoj.

Reta preparkurso

La reta teoria kurso baziĝas je mallongigita kursmaterialo de RITE (privata kurso de E-duKati, Katalin Kováts, trovebla en la Klerigejo de edukado.net <http://edukado.net/klerigejo/rite>), je ties 26 lecionoj pri metodiko kaj 14 leciona gramatika kurso. Je ambaŭ studobjektoj la unuoj konsistas el teorita parto, testo kaj hejmtaskoj, kiuj estas individue analizataj kaj taksataj. La lastaj lecionoj de metodiko preparas la studantojn al la prezentota modelleciono.

La materialo estas ampleksa, necesas plurmonata diligenta studado por trakti la lecionojn kaj plenumi ĉiujn taskojn.

Ĉeestaj kurs-semajnoj por praktiko

La teorian retan kurson kompletigas dum du kurs-semajnoj en Poznan, Pollando ĉeesta lertigado sub la gvidado de D-ino Katalin Kovats.

En tiuj seminarioj la partoprenantoj laboras tage en proks. seshora ateliero pri instruado, traktante konkretajn metodikajn taskojn.

En tiu ĉeesta programo okazas ankaŭ la prezento de la 15-minutaj modellecionoj de la kandidatoj.

La sukcesintoj en la teoria reta parto kaj en la praktika seminario surloka ricevos diplomon de ILEI pri la instruado de Esperanto.

La du semajnoj en Poznan koincidas kun la programo de la Interlingvistikaj Studoj, tiel la partoprenantoj havos eblon kunesti kun ties studentoj kaj kiel gastoj ĉeesti plurajn prelegojn de tiu programo.

Fine de la septembra sesio okazos ARKONES, kulture riĉega semajnfino kun ĉ. 200 partoprenantoj.

Partoprenkondiĉoj

Kono de Esperanto minimume je B2, sed prefere je C1 aŭ C2 niveloj. La aliĝintoj havos skajpan intervjuon kun Katalin Kovats.

Kosto de la formado: por la partoprintoj de la ILEI-kongreso en 2018 estos 55%-a rabato de la RITE-kursoj

<http://edukado.net/klerigejo/rite/kotizo>.

Jen la rabatitaj prezoj: Baza kotizo: 200 eŭroj, A-landoj 130 kaj B-landoj 80 eŭroj.

Pri eventuala stipendio la kandidatoj informiĝu ĉe la Landa Asocio, ĉe ILEI aŭ ĉe privatuloj.

Tiu kotizo inkludas la retan kurson, liberan aliron al ĉiuj instrumaterialoj de edukado.net kaj ĉeestan seminarion en du semajnoj, februare kaj septembre, en Poznan. (La kosto **ne inkludas** la loĝadon kaj manĝojn).

Jamaj studentoj de RITE povas sen plia pago partopreni la praktikan, ĉeestan parton, sed necesas, ke ankaŭ ili anoncu sian intencon frue.

La reta kurso startas la 1an de januaro 2018.

La unua poznana semajno okazos de la 3-a ĝis la 10-a de februaro.

La dua semajno okazos inter la 16 kaj 21a de septembro.

Aliĝi eblas ĉe katalin.kovats@gmail.com kun kopio al mirejo.mireille@gmail.com .
